

La Voĉo de **L** Kongreso

Eldono okaze de la 28a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — L I N Z — 12. aŭgusto — 6. aŭgusto 1955.

Linz, la danuburbo je la alp-rando, ĉi-jara ĉefurbo de S.A.T.

IOM PRI LA HISTORIO KAJ LA VIDINDAĴOJ DE NIA KONGRESURBO

Inter la grandurboj, kiuj ne tuj montras al la vizitantoj ĉiujn vidindaĵojn, ankaŭ apartenas Linz. Sed, estus granda eraro opinii, ke Linz nenion povas prezenti al siaj vizitantoj. Ne estas necese longe serĉi la belajojn kaj vidindaĵojn de la urbo, pro tio ankaŭ la intereso de la fremduloj pri la liglanda ĉefurbo konstante kreskas. Tion klare pravas la nombroj de la tranoktadoj.

Jam de komenco de la urba historio oni povas observi ĝin per pruvoj. Sur la »Freinberg« estas ankoraŭ videblaj la instalaĵoj de kelta fuĝejo. Jam en la pratempo Linz ofte estis modelo. Dum la epoko de la romanaj okupantoj »Lencia« estis fortika transigloko trans la Danubon. Antaŭ ne longe oni elfosis restaĵojn de tiu tempo, per kiuj estas konstatabla la vasteco de la romanaj kasteloj ambaŭflanke de Danubo, de malgranda civilurbo kaj de tombostrato. La fundamento de gardturo estas elfosita en la malnova urboparto kaj en densa proksimeco ankaŭ la fundamento de flagsanktejo. Ankaŭ la Martin-a preĝejo estas konstruita sur fundamentoj el la romana epoko, tie estas ankaŭ videblaj romanaj restaĵoj de pilastroj kaj ŝtonoj kun skribaĵoj, enkonstruitaj en la preĝeja muroj. El la ruinoj de malfru-romana profankonstruaĵo estiĝis pilastra arkonstruaĵo, kiu estis finkonstruata de Karlo la Granda dum la dua duono de la 8-a jarcento. Pri tio jam raportas Passau-a kodo el la jaro 799 p. K. Ĉar en tiu preĝejo estas videbla la tuta mezepoka konstrustila evoluo, tiu konstruaĵo ofte estas vizitata de en- kaj eksterlandaj arthistoriistoj. Dum la reparlaboroj en la jaro 1947 estis rekonstruata la iama niĉokonstruaĵo de la antaŭkarolinga epoko. La navo kun la diversaj pilastroj, kun arkoj kaj niĉoj estas precipe interesa. En ĝi troviĝas tre valorplena bildo de Volto-Santo el la 14-a jarcento.

Post finfina foriro de la romanoj Linz evoluigis helpe de multnombraj privilegioj al komerca urbo. Kiel la Martin-a preĝejo ankaŭ la apuda kastelo apartenas al la epoko de Karlo la Granda. Sed nur la en Linz reginta imperiestro Frederiko III. kaj liaj sekvoj daŭrigis la konstruadon de la kastelo. La »Frederika Pordego« estas la plej granda, ankoraŭ ekzistanta gotika konstruaĵo de la historia urboparto. (1481).

La kreskanta graveco de la urbo necesigis la konstruadon de ponto trans Danubon kaj konstruadon de haveno. La nova Linz-a foiro sur la ĉefplaco dum tiu tempo estis la plej granda de Eŭropo. Ekonomiaj kaj politikaj evoluadoj donis al Linz la superecon en Supra Aŭstrio. Pro tio sube de la ka-

stelo konstruis la burĝaj kasteloj dum la jaroj 1564—1571 la »Landhaus«, la plej imponan renesancan konstruaĵon, por montri la potencon de la burĝaro tiutempa. Tiu konstruaĵo nuntempe estas la liglanda registarejo.

Post la venko de la kontraŭreformacio la katolikaj monaĥejoj dokumentis sian venkon super la kontraŭuloj per granda ekstera evoluo pompa. Al tio dankas Linz la barokigon kaj la konstruadon de 16 barokaj preĝejoj kaj de multaj imponaj monaĥejoj. La monaĥejoj en densa proksimeco de Linz St. Florian kaj Wilhering mondfamiĝis pro la barokaj kaj rokokoaj belecoj. La plej famaj konstruistoj de tiu epoko, inter ili Lukas v. Hildebrandt, Jakob Prandtauer, Matthias Krinner, Johann Michael Prunner kaj la fratoj Canevale estis la konstruintoj. La pentristoj Martin kaj Bartholomeo Altomonte, Karl Reslfeld, Antonio Belucci, Carlo Carlone, Joachim v. Sandrart kaj Kremser-Schmidt verkis la bildojn. Raphael Donner, Franz Josef Mühl, Ignaz Hiebel, Kaspar Modler kaj Barberini estas la kreintoj de la plastikoj en la preĝejoj. Vizito de tiuj konstruaĵoj ege interesas la fremdulojn.

Tuj post la teruraĵoj de la kamparanaj militoj en la jaro 1671 estiĝis en Linz granda teksaĵfabriko kiu ankaŭ venigis laboron al miloj da hejmlaboristoj. Kiel en ĉiuj ur-

boj ankaŭ en Linz la fajregoj detruis multon de tiu urbo, precipe la fajrego en la jaro 1800 kaj same la trifoja okupado de Napoleon-aj armeoj kaŭzis grandajn damaĝojn al la urbo. En la jaro 1827 estis konstruataj la turoj de Maximilian kiuj, poste estis la modelo por la fortikaĵoj de Paris. De la restaĵoj de tiuj turoj estas konstruita jesuita monaĥejo. En la jaro 1832 estis konstruita la unua fervojo (ĉevala) sur la kontinento de Linz al Budweis kaj 1833 la unua vaporŝipo ekveturis de Linz.

Vaporŝipo, retparo kaj strato transigis la malnovajn komercajn vojojn. Pro tio la urbo por certa tempo perdis ion de sia graveco.

Ĉefe post la dua mondmilito denove ekfloris la vivo en la urbo, kvankam per bomboj dum la milito grandaj partoj de la urbo estis detruataj. La neimageble rapida rekonstruo de la urbo post la dua mondmilito estas nomata eksterlande ofte kiel Linz-a miraklo. La urbo ne nur novkonstruigis, sed ankaŭ plivastigis, beligis kaj plibonigis. Pro la rapida evoluo, precipe de pezindustrio necesigis administraj konstruaĵoj, lernejoj, loĝdomegoj, sportejoj (ekz. la stadiono kun 24.000 lokoj por vizitantoj), nova stadidomo kun belega antaŭplaco, la botanika ĝardeno, kaj la Linz-aj »nubskrapuloj«. La pezindustrio estas en konjunkturo

(Daŭrigo sur la 2. paĝo)



La danub-ponto kaj la modernaj konstruaĵoj ĉe la pontkapo

Renkonten al la Kongreso!

Alproksimiĝas la tagoj de la 28-a SAT kongreso en Linz. La grupo de SAT-anoj el Jugoslavio, kiu pasintjare ĉeestis la kongreson en Nancio, revenis hejmen entuziasmigita kaj kun multaj utilaj spertoj. Ili raportis kaj prelegis pri ĝi, informis pri la venonta kongreso en Linz, sed ankaŭ pri preparoj por la 29-a SAT-kongreso en Jugoslavio. Ĉio tio vekis inter niaj kamaradoj grandan intereson por la kongreso en Linz kaj deziron ĉeesti al tiu grava internacia manifestacio de laboristoj-esperantistoj.

Ni ne povas forgesi la impresojn el Nancio, estis ja unua nia vizito al SAT-kongreso. Nin ne tre mirigis oftaj demandoj kiel ni sukcesis el Jugoslavio veni al la kongreso, vojaĝi eksterlanden, ĉu ni ĝuas demokration, kaj multaj aliaj pli-malpli strangaj aŭ naivaj demandoj. Ni sciis, ke en eksterlando regas multaj malgustaj opinioj pri nia lando kaj ke malmultaj estas iom pli bone informitaj pri la ĝusta stato en Jugoslavio. Ni laŭ ebleco respondadis

kaj klarigadis. En la »Laborista Universitato« multaj kongresanoj havis okazon ricevi pli klaran bildon pri nia socialista lando.

Ni estis vere sincerkore akceptitaj de ĉiuj kongresanoj sed dum la kongresaj tagoj kaj precipe dum la ekskursoj la kamaradecaj sentoj forigis ĉiujn barojn. Ni ĉiuj sentis la samon: ni laboristoj-esperantistoj el ĉiuj landoj kreis unu fronton por altniveligi nian kulturon per la eksterordinare taŭga kaj efika rimedo — la internacia lingvo ESPERANTO.

Pro tio kaj pro ĉio vidita kaj spertita dum la 27-a ni alvokas ĉiujn, kiuj havas eblecon, veni al Linz ĉi-somere kaj ĉeesti en niaj kongresaj laboroj kaj manifestacioj.

Ni jugoslaviaj SAT-anoj deziras dum la kongreso efektiviĝi multflankan internacian kontakton kun la kongresanoj kaj aktive kunlabori en ĉiuj sekcioj de la kongreso. Ni penos, ke niaj diskutoj kaj proponoj estu realaj, ni fervore esploros la efektivajn eblecojn por solvi diversajn problemojn

kaj ni esperas ke la kongresa laboro estos fruktodona.

Tuj post la kongresaj tagoj ni devos transpreni la preparlaborojn por la arango de la 29-a en nia lando. Niaj spertoj el la lastaj du kongresoj helpas nin. Ni devos streĉi ĉiujn niajn fortojn kaj kapablojn por organizi brilan kongreson.

Jam nun ni povas garantiĝi al ĉiuj kamaradoj, ke ni sincere kaj bonkore akceptos ilin en nia lando, kie ili povos vidi multon interesan. Ni ebligas al ili koniĝi kun la ĝisnunaj rezultoj de nia socialista sistemo. Ĉar Jugoslavio aktive batalas por la tutmonda interkompreniĝo, por la paco kaj libero, la internacia kunveno de progresemaj laboristoj kia estas nia SAT-kongreso ĝuos nian ĝeneralan simpatian kaj sindonan apogon.

Landa peranto de SAT por Jugoslavio

Josip Vajdlj

(Daŭrigo de l' fruntartikolo)

kaj la nombro de la enloĝantoj jam proksimiĝas al 190.000. La kulturaj postuloj de la enloĝantoj kreskis kaj la urba administracio klopodas, plenumi ilin. La multaj koncertoj, la ekspozicioj de la landa muzeo, de la nova Galerio, de la Fervoja muzeo kaj la altlernejo altiras multe da fremduloj. Ankaŭ la landa teatro modele kontribuas per siaj prezentaĵoj, al kiuj regule la loĝantoj de la aliaj urbetoj kaj vilaĝoj povas veni per specialaj trajnoj. Ŝajnas preskaŭ, ke oni forigis kun la milita rubo ankaŭ la reston de la provinca Linz. Nun la urbo meditadis pri sia grava misio: La komercurbo apud Danubo evoluiĝis al vivoplena moderna industriurbo. Per tiu ekonomia evoluo ankaŭ la historiaj kaj kulturaj valoroj ricevas novan sencon.

Tipe por moderna grandurbo estas la harmoniaj kaj modernaj vendejoj kaj amuzejoj kaj la vigla vivo ĝis en la profunda nokto. Ankaŭ la Linz-aj hoteloj povas plenumi la postulojn de ĉiuj gastoj; de unu el la plej modernaj hoteloj de Aŭstrio ĝis la plej simpla, pura gastejo, la fremdulo trovas konvenan tranoktejon. La fremdultrafika informejo en la stacidomo helpas la fremdulojn, trovi la ĝustan tranoktejon.

La fremdulo, alveninte en Linz-a stacidomo staras mirante antaŭ unu de la plej belaj stacidomaj placoj de Eŭropo, kie dum somero dekmiloj da belegaj floroj floras.

★

Ĉe ponto, kiu ligas la okcidentan kaj la orientan mondon, situas la urbo de nia 28-a kongreso. Tie estu la vojaĝcelo por la SAT-anoj kaj aliaj kongresanoj, kiuj venos kiel gastoj al nia kongreso. En la domo de la komerca unuiĝo, la sola, kiu taŭgas por tiaj aranĝoj, ni ĉi-jare laboros, aŭdos prelegojn, kunsidos kaj distros en amikeca rondo. Ni jam ĝojas, ke ni havas la eblecon, aranĝi la ĉi-jaran kongreson kaj faras nian taskon kiel eble plej bone. Ni streĉas ĉiujn niajn fortojn, por ke vi havu tre bonan restadon en nia urbo. Ni povas gastigi facile 800 kongresanojn kaj petas vin pro tio, varbu ankoraŭ kamaradon aŭ alian esperantiston, ke li partoprenu kiel gasto dum nia kongreso. Ju pli da partoprenantoj, des pli granda la sukceso de nia afero. Ni ne dubas, ke ankaŭ ĉi-jare regos la jam kutimata kamaradeca atmosfero dum la kongreso.

Por la jam kutimataj kongrespartoprenantoj ni volas prezenti kiel eble multe da klerigaj prelegoj en la kadro de nia Laborista Universitato. La aliaj, kiuj volas amuziĝi, certe ankaŭ trovos sufiĉe da eblecoj dum la diversaj vesperaj aranĝoj. Dum la

diversaj ekskursoj vi havos la eblecon, krom la muzeoj ankaŭ vidi laborejojn kaj tiamaniere studi la labor- kaj vivkondiĉojn en nia eta lando. Por gajni eminentulojn por kunhelpo ĉe nia aranĝo kaj por pligrandigi la propagandan efikon ni invitis aron da eminentuloj al honora komitato.

Sed, partoprenantoj de la 28-a, vi mem devas kontribui la plej gravan per via ĉesto kaj per kunpreno de bona humoro, kaj muzikantoj per kunpreno de la iloj. Ni ĉefe aranĝis por vi la eblecon por bona

restado, sed vi mem devas kontribui per viaj prelegoj, prezentaĵoj kaj per via intereso sekvi niajn kongresajn aranĝojn. Ni invitas ĉiujn esperantistojn kore, sed ili ankaŭ devas regi la lingvon, ĉar ĝi ne estu turisma aranĝo, sed vera kongreso. Komentantoj almenaŭ devas esti kapablaj al interkompreniĝo.

Bonan vojaĝon al la 28-a en Linz ni deziras al vi. Vi ĉiuj estu kore bonvenataj kaj al revido ĝojas

O. K. K.



Unu de la multnombraj arkadaj kortoj en Linz-aj malnovaj burĝaj domoj. Tiu bildo montras la arkadan korton en Landhaus

LANDHAUSHOF



Provizora programo

SABATE — 6-a de AŬGUSTO:

20.00 h Interfratiga vespero en la bildosalono de la kongresejo aŭ en la granda salono. Estas apartaj tabloj. Aŭ sen prezentaĵoj, aŭ kun kelkaj prezentaĵoj, la interfratiga vespero ja servu iaŭ la nomo. Posttagmeze por la alvenintoj gvidado tra la urbo.

DIMANĈE — 7-a de AŬGUSTO:

9.00 h Solena malfermo de la kongreso. Salutaroladoj de eminentuloj kaj de la delegitoj de la diversaj landoj. Poste kongresfotado.

14.00 h Vizito de Freinberg, de kies elrigardturo vi povas vidi ne nur la urbon, sed grandan parton de Aŭstrio.

20.00 h Kultura vespero en kunlaboro kun urbaj instancoj, ĉe bela vetero estas antaŭvidata liberaera prezentaĵo, alikoze en kongreseja salono.

LUNDE — 8-a de AŬGUSTO:

9.00 h Unua laborkunsido

14.00 h Vizito al fabrikoj, laborejoj, muzeoj, ktp.

20.00 h Malfermo de Laborista Universitato. Lumbildprelego pri la unua Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

MARDE — 9-a de AŬGUSTO:

9.00 h Dua laborkunsido.

14.00 h Duontaga ekskurso per ŝipo sur Danubo al Neuhaus kaj reen.

20.00 h La kongreso dancas. Kongresa bala por la dancemuloj. Por nedancantoj valsokoncerto sub la devizo: »Vespero ĉe Lanner kaj Strauss«.

MERKREDE — 10-a de AŬGUSTO:

9.00 h Tria laborkunsido.

14.00 h Vizito al fabrikoj kaj muzeoj.

20.00 h Laborista Universitato.

ĴAŬDE — 11-a de AŬGUSTO:

7.00 h Preciza ekveturo. Tuttaga ekskurso per aŭtobusoj. Por aŭtobusaj karavanoj la partopreno estas senkosta, la aliaj pagos nur por la aŭtobusoj. Por fervojistoj ne eblas veturi per trajno, ĉar ni veturos aliajn vojojn.

VENDREDE — 12-a de AŬGUSTO:

9.00 h Laborista Universitato — prelego.

14.00 h Ekskurso.

17.00 h Fermo de Laborista Universitato — Debatoj.

20.00 h Gaja vespero — Kontribuoj de la kongresantoj, de folkloro grupo de Linz, de kantasocio, kiu prezentos kantojn en Esperanto kaj germana lingvoj.

23—24 h Adiaŭoj.

Krome lundon, merkredon kaj vendredon je la 17-a h fak- kaj frakcikunsidoj kaj la kromaj estas afiŝataj en la kongresejo laŭ bezono.

POSTKONGRESA ARANĜO

en Wörgl; la urbo, kie staras la 1-a aŭstria Zamenhof-monumento. Por tiu aranĝo alvenis jam kun la unuaj aliĝintoj kelkaj anoncoj.

EL LA PROGRAMO: Sabate vespere omika kunveno, vizitata de kelkaj eminentuloj, komunikado pri la programoj de la venontaj tagoj. Dimanĉe antaŭtagmeze solena ceremonio ĉe la Zamenhof-monumento, posttagmeze banekurso al la ilim-bano en Kirchbichl, vespere »granda Tirol-a vespero«.

Dum la sekvantaj tagoj kelkaj belegaj ekskursoj el ĝis Innsbruck kaj al Hafelekar. La ĉeeston de tiu aranĝo certe neniu bedaŭros.

Ĉiu nia infano-esperantisto estu abonanto de bela kaj bonenhava gazeto

»NIA VOĈETO«,

abonebla ĉe k-do Petro Louis, Nancio, 96, rue Nabecor, Francio.

ORGANIZA KONGRESA KOMITATO KOMUNIKAS KONSILOJN kaj INFORMOJN

MONŜANĜOJ:

En nacia banko kaj en multaj aliaj bankoj por landoj, kies kursoj estas notataj, por la aliaj landoj nur en nacia banko (ekz. Jugoslavio). Sumo ne estas limigata. OKK klopodas, ke ŝanĝebleco estas en oportunaj tempoj por la kongresantoj.

PROVIZORAJ KONGRESKARTOJ:

Ili estas forsendotaj komence de junio al ĉiu aliĝinto. Neprę kunprenu ĝin al Linz por faciligi la laboron de OKK. Por la prov. kongreskarto vi ricevos slipon kun via konto. Vi estas petataj, tuj kontroli ĝin, kaj pagi la sumon al la kasisto. Post la pago vi ricevos la kongresmaterialon.

RABATO POR FERVOJOJ:

Ne eblas laŭleĝe en Aŭstrio, ricevi rabatilojn kiel pasintjare en Francio. Sed, ĉar la plej multaj eŭropaj fervojoj donas rabaton por grupoj de almenaŭ dek personoj, ni konsilas al vi, kontaktu vian landan peranton, por organizi karavanojoĝon al Linz, se ne eblas aŭtobuse, almenaŭ per fervojo. La rabato en la diversaj landoj varias inter 10 kaj 33%. Via trafikoficejo certe informos vin pri tio. Necesas do, sufiĉe frue informiĝi pri la rabatoj tie.

VIZOJ:

Estas nur necesaj por jenaj landoj: Hispanio, Jugoslavio, Orientgermanio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Hungario, Albanio, Romanio, Bulgario kaj Rusio. La ekstereŭropaj gek-doĵ demando ĉe la policejo, kiu eldonas la pasportojn, ĉar povas aliĝi la rilatoj dum la kelkaj monatoj. Usonanoj ankaŭ ne bezonas vizon. La restado estas por la eksterlandanoj limigata kaj varias inter 6 semajnoj kaj 4 monatoj.

LOĜADO:

Por la loĝado en ĉiuj kategorioj ni eldonas kuponojn, kiuj troviĝos en la kongreslibro. Tio validas ankaŭ por la loĝantoj en hoteloj de ambaŭ kategorioj. Ĝi ŝajnas al ni grave, por eviti malprofiton al la kongresantoj. Kiel pasintjare ankaŭ ĉijare la amasloĝejoj estos nomataj per Esperantonomoj kiel Universo, Estonto, Espero ktp. La adreso de via loĝejo troviĝos ankaŭ en la kongreslibro. Krome estas ĉe la kongresmaterialo prospekto kun ruboplano de Linz, en kiu vi trovos la kongresejon kaj la diversajn amasloĝejojn.

MANĜO:

Por tiuj gek-doĵ, kiuj mem elektos inter rekomenditaj restoracioj, ni publikigos en la dua numero de »Voĉo« liston de rekomenditaj restoracioj. Por manĝantoj en la kongresa restoracio ni povas diri, ke ili certe estas kontentaj pri la manĝaĵo. Ni estas konvinkataj, ke sufiĉos kaj bongustos. En la kongresa restoracio vi pagos per kuponoj, kiuj nur validas por la indikata tag- kaj vespermanĝo. La kuponoj ne estas repagotaj pro neuzo. Matenmanĝon vi povas ricevi en la diversaj kaftrinkejoj aŭ vi povas aĉeti laktan, eĉ varman en multaj laktovendejoj, kie vi ankaŭ ricevos bulkojn aŭ aliajn farunaĵojn laŭ via gusto. Tio estas la plej malmultekosta matenmanĝo.

Ĉar en la sama domo, kie troviĝos la kongresejo, ankaŭ troviĝos publika restoracio kaj gastejo, ni ne povas instali kongresan bufedon, sed certe neniu bedaŭros tion, vizitante la restoracion.

EKSPOZICIO

en la kongresejo estas en preparo: La ekspozicio estas dum la tuta semajno publike vizitebla. Ni petas por tio materialon, precipe gazetojn, kiujn ni ankaŭ volas disponigi al la kongresantoj en speciala legosalono. En la legosalono estos afiŝata la fak- kaj frakcikunsidoj, la diversaj ekskursoj kaj ĉio, kio interesas la kongresanojn.

EKSKURSOJ:

Krom la ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon, kiujn ni jam antaŭe ne volas ligi al iu tago, ĉar dependas de la vetero, ni gvidas la interesojn en la muzeon de Linz, en la fervojistan muzeon, en la novan Galerion kaj al jenaj laborejoj:

Por fervojistoj en la ĉefriparejon de Linz, por grafikistoj en la Gutenberg-presejon, por fermetiistoj en la Linz-an feruzinon, por hemiaj laboristoj en la hemian uzinon »Stickstoffwerke«, krome al bierfabriko de Linz, al cigaredfabriko, al lignaĵejo ktp. Al lignogravuristo, artisto en metio, kiu estis juĝata al morto, ni povas gvidi ĝis 20 interesulojn. Estas pro la diverseco de la ekskursoj nepre necese, ke ĉiu en la aliĝilo indiku la metion. Se iu krom tio interesiĝos pri iu ekskurso, OKK petas, komuniku tion al ni, por ke ni povu aranĝi por ĉiu la ĝustajn ekskursojn.

AMATOROJ:

Kunprenu viajn muzikilojn por prezenti al la kongresanoj dum la interfratiga kaj nepre dum la gaja vespero. Neprę antaŭe kontaktu kun OKK, por ke ni havu superrigardon. Ni donas ĉiujn informojn.

NI MEMORIGAS AL VI,

ke ni ne respondecas pri mankoj por ne precizaj respondoj en la aliĝilo. Gek-doĵ, kiuj intencas alveni jam unu tagon antaŭe aŭ dum nokto estas petataj, informi OKK. Ni akceptos tiujn gek-doĵn ĉe stacidomo kaj gvidos en la tranoktejon. Ankaŭ ŝanĝojn en via aliĝilo aŭ mendilo anoncu sufiĉe frue, nepre antaŭ via alveno en Linz, por ke ni ŝanĝu ĉion en la kasslipo. Vi per tio grave helpas al flua pritrakto en la kongresejo, ĉar nek vi, nek la sekvonto ĝojas pri longa atendo.

FAK- kaj FRAKCIKUNSIDOJ:

Estas sufiĉe da loko kaj apartaj ĉambroj por la diversaj kunsidoj. Kvin kunsidoj povas okazi samtempe en ĉambroj, kie la partoprenantoj tute ne estas ĝenataj de aliaj grupoj. Ni petas rapidan anoncon kaj komunikojn pri la nombroj de partoprenantoj antaŭvidataj kaj kunsidoj. Kunsidoj estu anoncigitaj almenaŭ ĝis la 7. julio en Linz!

EN LA KONGRESEJO TROVIĜOS

informejoj, libroservo kaj poŝtoficejo. En la legoĉambro vi povas legi diversajn Esperantogazetojn, tradukojn el la lokaj gazetartikoloj, kiuj rilatas nian kongreson k. t. p.

GEKNABA KONGRESETO:

Aliĝo senpaga sed deviga por geknaboj ĝis 15-jaraj. (Anoncu en la kongresaliĝilo). Ĉiuj kongresantoj ricevos specialan »Voĉeton« antaŭ la kongreso, enhavante ĉiujn klarigojn pri la programo. La »Voĉeton« eldonos la pasinta OKK-sekretario k-do Louis. Tiu bulteno jam nun aperas regule ekde la pasinta kongreso. Ĉiu el la geknaboj esperantistaj sendu skribaĵon al la eldonanto de la Voĉeto, k-do Petro Louis, 96, rue de Nabecor, Nancio, Francio.

Loĝado kaj manĝo por la geknaboj:

Kiel pasintjare, ankaŭ ĉijare la geknaboj povas loĝi aŭ kun la gepatroj, aŭ en amasloĝejo B, tie ili nur pagos 3 ŝ. Certe tiu loĝado estas pli alloga por la geknaboj tre malmultekosta kaj ebligu al la gepatroj la kunprenon de la infanoj al nia geknaba kongreseto. Ni ankaŭ povas rezervigi tablojn por la geknaboj en la kongresa restoracio. Por tio antaŭmendo estas necesa, sed ni petas, anoncu tion sabate antaŭtagmeze en la kongresejo. Por komuna loĝado en amasloĝejo B la konsento de la gepatroj estas necesa. Aparte por knaboj kaj knabinoj

**GKNABA KONGRESETO
EL LA PROVIZORA PROGRAMO:**

Sabate: Alveno kaj interkonatiĝo de la geknaboj el la diversaj landoj. Posttagmeze libera promeno kun la gepatroj aŭ kun gvido de k-do aŭ k-dino de OKK.

Dimanĉe: Ĉeesto dum la solena malfermo de la kongreso kaj fotado. Posttagmeze ekskurso al elrigardmonteto de Linz, de kie oni vidas la nordo ĝis la ĉeĥa limo kaj en la sudo la tutan alpĉenon.

Vespere komuna kanto kaj ludoj en la ejo de la geknaboj.

Lunde: Matene ludo per pilkoj kaj verketado. Posttagmeze veturado al Pöstlingberg, kie ni vidas la bele lumigitan grotfervojn, montrante la diversajn fabelojn kaj fablojn.

Marde: Matene ludi, verketi kaj komune ludi, posttagmeze partopreno al duontaga ekskurso per ŝipo, senkosta por la geknaboj.

Merkrede: Matene ekskurso en la arbaron, posttagmeze banado aŭ vizito de la plej modernaj lernejo kaj infangardejo de Linz.

Jaude: Partopreno al la tuttaga ekskurso. Se eblas, ankaŭ tio estas senpaga, se ne, almenaŭ reduktita.

Vendrede: promeno en la ĉirkaŭaĝoj. Definitiva programo ne estas fiksebla, ĉar dependas de la vetero, ni povas dum bela vetero pli ofte bani kaj ekskursi, dum pluvo pli multe ludi kaj kanti. Ankaŭ la geknaboj de la asocioj »Infanamikoj« kaj »Ruĝaj Falkoj« prezentos ion al vi.

Do certe ankaŭ por vi kaj viaj infanoj estas interesa la partopreno al nia 28-a kaj 2-a geknaba en Linz. Ni pro tio invitas ĉiujn infanojn, parolantajn Esperanton tutkore al partopreno. Okazos ankaŭ premioj konkursoj por la geknaboj laŭ aĝoj partitaj. Belaj premioj estas en preparo!

HONORA KONGRESKOMITATO

Por pligrandigi la propagandan efikon de nia 28-a kongreso ni ankaŭ invitis eminentulojn al la honora komitato. Estas invitataj jenaj personoj:

Urbestro de Linz, d-ro Ernst Koref, kiu ankaŭ honore protektas la kongreson, Urbestro de Vieno, s-ano Franz Jonas, Eksministro, s-ano Hanns Frenzel, Vieno, D-ro Tursky, de la Linz-a fremdultrafik-ejo,

Viclandestro Ludwig Bernaschek, Linz, S-ano d-ro Grimme, prezid. de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista,

D-ro Grau, direktoro de la Linz-a popol-altlernejo,

K-do Glüxmann, prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio.

Heinrich Kandl, prezid. de Laborista Ĉambro, Linz,

Ŝtata sekretario s-ano Rudolf Fischer, Vieno, kaj

S-ano Otto Stöber, fondinto de »D-ro Zamenhof Esperanto fondajo«.

Postkongresaj aranĝoj

Junulfaka renkontiĝo; 13-a—19-a de aŭgusto 1955

En la bela pejzaĝo, kie eblas belaj ekskursoj kaj montarimpadoj, ankaŭ por nesperituloj, ĉar nedanĝeraj. La loko ankoraŭ ne estas fiksata, ĉar ni volas antaŭe scii, pri la proksimuma nombro de partoprenantoj. Estas sufiĉe da eblecoj kaj ni ne dubas, ke vi estos kontentaj. Pri la programo kontaktu kun k-do Klaŭdio Kleinclauss, en Benamenil M. et M., Francio.

Pri la restadkostoj legu en Junia numero de Juna Penso. Ĝis tiam ni solvos ĝin tiel, ke ni jam povos doni al vi detalajn rilato la programon. Certe neniu trovos kaŭzon por plendi pri nia solvo.

Laborista Esperanto societo en Zagreb, petas gekorespondantojn el la tuta mondo por siaj kursfinintoj kaj societanoj. La temoj: metalista, lignajista, ledista, konstrua, grafika, laborasekura kaj politika. La respondoj certigataj! Adreso: Josip Vajdlih, Zagreb, Podolje 15, Jugoslavio.

EL LA LISTO DE L'ALIĜINTOJ

1—2 Gek-doj Leon Lentaigne, Balarucles-Bains, Herault, Francio; 3. K-dino Riondelet Emil., Sarcey, Rhône, Francio; 4. K-do Norbert Bartelmes, Paris, Francio; 5—7 Gek-doj Louis Clerc, Chevry-en-Sereine, Francio; 8. S-ino Marie Marty, Belfort, Francio; 9—10. Gek-doj Edmond Dazun, Paris, Francio; K-do Lucien Bannier, Paris; 13. K-do Gaston Morgand, Montpellier, Francio; 14. K-do A. P. da Silva, Lisbono, Portugalio; 15. K-do Manfred Führer, Zürich, Svisio; 16. K-do A. B. Ostensen, Oslo, Norvegio; 17. K-do David Engelsher, Tel Aviv, Izraelio; 18—19. Gek-doj Julius Ackermann, Wöwinkel-Wuppertal, Germanio; 20—21. Gek-doj van Sitteren, Berchem-Antverpeno, Belgio; 22. K-do A. Chorras, Valence sur Rhône, Francio; 23. K-do Manuel Romerales, Foix, Francio; 24. K-dino Francine Baud, Craponne, Rhône, Francio; 25. K-do Mario Guzzi, Torino, Italio; 26—27. Gek-doj Magnus Jacobsen, Arhus, Danlando; 28—29. Gek-doj Rasmus Jørgensen, Aabyhøj, Danlando; 30—31. Gek-doj Søren Christensen, Aabyhøj, Danlando; 32—33. Gek-doj Gustav Loibel, Wien, Aŭstrio; 34—35. Ges-anoj Karl Patlak, Wien, Aŭstrio; 36. S-rino Therese Kittel, Wien, Aŭstrio; 37—38. Gek-doj Louis Pannier, St. Radegonde, Francio; 39. K-do Louis Enizan, Rennes, Francio; 42—43. Gek-doj Henri Chabriere, Lyon, Francio; 44. K-do Klaudio Gicquel, Choisy le Roi, Francio; 45. K-do Perpete M., Choisy le Roi, Francio; 46. K-do Charles Billard, Choisy le Roi, Francio; 47. K-dino Billard, Choisy le Roi, Francio; 54. K-do Ludwig Wiesleitner, Graz, Aŭstrio; 55. S-rino Helene Havranek, Wien, Aŭstrio; 56. K-do Martin stöckl, Innsbruck, Aŭstrio; 57. K-do Anton Spitzenstatter, Innsbruck, Aŭstrio; 61. K-do R. C. Marble, van Nuys, Calif., USA; 62. K-do Johano Saint-Remy, Lieĝo, Belgio; 63. K-do Th. Mortiers, Antwerpen, Belgio; 64. K-do J. Kuipers, Rotterdam-W., Nederlando; 65—66. Gek-doj Adrianus Kooy, Rotterdam-W2, Nederlando; 69. K-do Jakobus Kries, Zaandam, Nederlando; 74. K-dino Hermine Fuchs, Wiener Neustadt, Aŭstrio; 75. S-rino Maria Jorde, Wien, Aŭstrio; 78—79. Gek-doj Emil Vokal, Wien, Aŭstrio; 82—83. Gek-doj Sylvestre Guillou, Tremeven, Francio; 86. K-do Klemento Martin, Rennes, Francio; 87. K-dino Alida Lee-reveld, reveld, Tasmanio, Aŭstralio; 88. K-do Harold W. Fidge, Adelaide, Aŭstralio; 90—91. Gek-doj Joannes Rival, St. Etienne, Francio; 92. K-dino Margarete Korzen, Hamburg Germanio; 93. K-do Franz Steiner, Stuttgart, Germanio; 94—96. Gek-doj Karl Flachsmeier, Düsseldorf, Germanio; 97. K-do Henri Cottereau, Vaupillon par La Loupe, Francio; Gek-doj Petro Louis, Nancy, Francio; 101—102. Gek-doj André Sigonneau, Ivry, Francio; 103. K-do Alois Ramschak, Villach, Aŭstrio; 104. K-do Kasimir Dittenheber, München, Germanio; 105. K-do Konrad Deubler, München, Germanio; 106. K-dino Franziska Ensenberger, Vöcklabruck, Aŭstrio; 107. K-dino Leopoldine Schmierer, Vöcklabruck, Aŭstrio; 108—109. Gek-doj Josef Beckmans, Antwerpen, Belgio; 110—111. Gek-doj Lachmayr-Fohler, Vöcklabruck, Aŭstrio; 112—113. Gek-doj Jan Wilhelm Pret,

Ilford, Anglio; 116. K-do Edwin Ash, Peterborough, Anglio; 117—118. Gek-doj W. A. v. Groeneveld, Rotterdam, Nederlando; 119. K-dino Tiny van Duffelen, Alkmaar, Nederlando; 120. K-dino Maria M. v. Gink-Daxböck, Schiedam, Nederlando; 121—122. Gek-doj Antonius Vollegraaf, Rotterdam, Nederlando; 123. K-dino Rosemarie van Eck, Zuephen, Nederlando; 124. K-dino Anneke ter Braak, Zwolle, Nederlando; 125—126. Gek-doj v. Buitenen, Rotterdam, Nederlando; 132. K-do Brito Lopes, Santos, Brazilio; 133—134. Gek-doj Gilbert Ledon, Pelotas, Brazilio; 135—136. Gek-doj Costa, Santos, Brazilio; 141. K-do Stephan Zodel, Wien, Aŭstrio; 142. K-do Friedrich Mosek, Wien, Aŭstrio; 143. S-ano Alois Postl, Döllach, Aŭstrio; 76. K-do Einar Eneroth, Malmö, Svedio; 77. K-do Henrik Karlsson, Kisa, Svedio; 81. K-do G. Waringhien, Choisy-le-Roi, Francio; 89. K-do Ralph Bonesper, New York, USA; 127. K-dino Bekkers-Scholten, Vinkenbuurt 6, Nederlando; 128. K-do L. de Haan, Rotterdam-N, Nederlando; 146. K-do Gustav Schmid, Wiener-Neustadt, Aŭstrio; 147. K-do Schwarz, Villach, Aŭstrio; 150. K-do G. Marin, Stroud, Anglio; 148. K-do A. Dean, Presswich, Anglio; 149. K-do Jozefo Lopes, Aucun, Francio; 145. K-do H. J. Clayton, Sheffield, Anglio.

ALIĜINTOJ EL JUGOSLAVIO

1. Grvić Jakov, Zagreb; 2. Sekelj Antonije, Beograd; 3. Hurčak Anjo, Sl. Brod; 4. Katić Emilija, Sl. Brod; 5. Antonijević Ilija, Beograd; 6. Milenković Dušan, Beograd; 7. Sekelj Ljiljana, Beograd; 8. Jutriša Franjo, Sl. Brod; 9. Prof. Popović Božo, Sarajevo; 10. Obad Geza, Zagreb; 11. Vokoun Franjo, Zagreb; 12. Preksavec Josip, Zagreb; 13. Slama Stanislava, Nova Gradiška; 14. Bičanić Stjepan, Zagreb; 15. Karleuša Stojanka, Vrbas; 16. Havana Tomo, Vrboska, otok Hvar; 17. Zlatnar Peter, Ljubljana; 18. Zlatnar Mila, Ljubljana; 19. Zlatnar Slobodan, Ljubljana.

NI STARAS ANTAŬ LA TRIA SINDIKATA KONFERENCO

Bedaŭrinde mi unue devas fari kritikan observon koncerne la agadon de sindikatoj.

Inter milioj en la mondo sindikate organizitaj gelaboristoj, mi kredas, ke estas almenaŭ cent esperantistoj.

De tiuj cent se nur unu dekono konscie kaj entuziasme plenumus siajn esperantistajn taskojn, la rezultoj estus certe pli kontentigaj.

Okazis jam pluraj kongresoj, konferencoj, kunvenoj, diskutoj k. t. p., pri la metodoj, manieroj kaj formoj de pli efika agado inter vivantaj homoj por apliki esperanton.

Kiom foje ni kun miro diris: »ho ve, ĉu ni tiel malmultnombraj estas?«

Jes, estas vero, homoj havas cent diversajn zargojn kaj devojn, kaj aktive agi por esperanto estas granda ofero, ĉar por tiu agado la kondiĉoj estas multflankaj, tiu laboro foruzas multan tempon. Sed mi kredas ke ni ne kolapsis, ke por ni poresperanta agado ne estas ĝena altrudo.

Mi estas konvinkita ke la Regularo por Internacia sindikata kontakta komitato esperantista, al neniu ĉe la konferenco estis altrudita. Ĝi estis pridiskutita kaj la rimarkoj de opuloj konsiderataj. Kaj kial ne obei kamaradecajn konkludojn? Laŭ la intereso de opuloj el diversaj landoj, mi estas profunde konvinkita ke la I. S. K. K. E. havas sian pravigon en Linz, estas jam anoncite ke okazos III-a Konferenco de sindikatoj, dependas de ni ĉiuj la sukceso. Aŭ eble ies intereso estas mala?

F. Vokoun

NATURAMIKA ARANĜO

Sabate matene ekveturo al Salzburg, rigardo de la urbo ĝis la 15-a, daŭriĝo de la veturado ĝis Bockstein.

Ekskursoj: Al Pochhartseen 2061 m. s. marnivelo, Bad Gastein, suprenveturo per kablfervojo al Stubnerkogel, 2245 m, vizito al la armeinoj, montsupreniro al Pochartscharte 2238 m, Niedersachsenhaus 2400 m, Schareck 3131 m, Hagener Hütte 2430 m.

La kostoj por la manĝado, tranoktado, gvidado estas 300—350 ŝ. Antaŭpago de 50 ŝ. (2 dolaroj usonaj) estas necesa.

Informoj donas: La Naturomikoj, Esperantofako, Vieno 15, Diefenbachgasse 36, Aŭstrio.

Anoncojn direktu al la sama adreso aŭ indiku en la aliĝilo por OKK.

Eldonas: Laborista Esperanto societo Zagreb, Ĉefa kaj respondeca redaktoro, Vokoun Franjo Zagreb, I. Stora Pešenića 50. Teknika redaktoro Obad Geza Zagreb II, Švearova ul. 1. — Presejo: »Ognjen Prica«, Zagreb, Savska cesta 31, Jugoslavio.

La Voĉo de Kongreso

Eldono okaze de la 28a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda — L I N Z — 6. aŭgusto — 12. aŭgusto 1955.

Koran bonvenon!

Estas hazardo, ke ni nun 10 jarojn post la liberigo fakte estas liberaj. Kiu pli bone komprenas la disharmonion inter la diversaj popoloj kaj registaroj pro malfido, ol ni sennaciistoj, kiuj scias la solan kaŭzon de intrigoj kaj politikaj jaluzoj. Ĉio estas artefarita en la nomo de la »Sankta Naciismo«. Nia organizo tiurilate, kvankam batalante kontraŭ la naciismo, estas neŭtrala rilate la diversaj dogmoj, kaj pro tio estas ankaŭ bona okazo, ke tiu kongreso okazas en lando, kiu ĵus deklaris sian nepran neŭtralecon. Neŭtrala kongreso en neŭtrala lando, sed ankaŭ laborista kongreso en lando kies laborista partio estas preskaŭ same forta, kiel la konservativa partio, kiu ja nur estras pro la subteno de la ekleziaj cirkloj. Kaj vidante malantaŭ la kulisoj de tiuj estrantoj oni denove devas konstati, ke la diaj leĝoj laŭiliaj agoj similas gumobandon, kiun oni povas turni kaj plilongigi laŭ bezono. La predikita vorto kaj la agoj estas plejofte renversaj. Ĉu ni ne pro tio ankaŭ jam estas sur ĝusta vojo, batalante kontraŭ la dogmoj, kiuj ja fakte nur ekzistas sur pacienca papero?

Linz, urbo, kiu post la milito multe kreskis, estas la dua aŭstria urbo, kiu gastigas SAT-Kongreson. La 5-a kongreso de SAT okazis en Vieno en la jaro 1925. Ĝin partoprenis 150 personoj kaj la nunan? Ĉis la 1-a de junio aliĝis 425 partoprenantoj. La precisa nombro ne estas antaŭvidebla, tamen ni kalkulas pri la sama nombro proks. kiel pasintjare en Nancio. Tiu nombro estas certe kontentiga, se ni pripensas, ke nia movado ja ekzistas el membroj, kiuj apartenas al la laborista klaso kaj pro tio ne posedas tion da mono, ke ili facile povas partopreni kongreson en malproksima lando. Alia kaŭzo estas ke multaj ne ĉiujare ricevas libertempon, kiam ili deziras aŭ bezonas por parto-

preni la kongreson. Sed estas ankoraŭ alia fakto, nome, ke estas multaj simpatiantoj en landoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne havas la eblecon, partopreni niajn kongresojn. Despli kore ni salutas tiujn, kiuj venis en nian urbon, por partopreni nian kongreson, sed ankaŭ tiujn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas ĉeesti, sed kies koro certe apartenas al nia movado kaj nia kongreso. Granda estas la nombro de kamaradoj kiuj nur spirite partoprenas nian kongreson, pro supre menciitaj kaŭzoj, sed ni esperu, ke ankaŭ por ili venu la tago, kiam ili superos la nunajn kaŭzojn, ĉu ekonomiajn, ĉu politikajn kaj povos ĉeesti niajn kongresoj laŭ deziro. Venu la tempo, kiam la laboristaro tutmonda unuigĝas, sed ĝi venu baldaŭ. Unuigo estas ankaŭ ebla per toleremo kaj komprenemo, ne nur per unuformigo de la mondo.

Ni, O. K. K. preparis por vi ĉiuj kiel eble plej bone la grundon, sed vi, partoprenantoj de la kongreso kunprenu la kamarade-

con kiu regu dum la kongreso en nia kunvenejo kaj ĉie, kie troviĝas la partoprenantoj. La laborkunsidoj estu fruktedonaj, kiel ankaŭ la fak- kaj frakcikunsidoj. Ne forgesu, ke la partoprenantoj mem estas la kongresantoj, la O. K. K. nur povis antaŭlabori por ke vi trovu ĉion jam ordigita. Ni faris nian eblon, kaj ni esperas, ke ĉiu estos kontenta. Se iu pro ia kaŭzo havos plendojn, O. K. K. certe ĉiam estas je via dispono. Certe tio aŭ la alia ne estas kiel dum pasintaj kongresoj, ĉar dependas de la lokaj cirkonstancoj, sed tamen ni esperas, ke ĉiu estos kontenta.

Ni montru ankaŭ en Linz al la publiko, ke ni trovis la ĝustan vojon, ne nur por interkompreniĝo, sed por progresemo kaj paciĝo de la mondo. Ni estu konsciaj pri io, ke ni estas sur ĝusta vojo, sed ni ankaŭ montru tion al aliaj, kiuj ankoraŭ ne estas en nia movado, por ke ĝi kresku, por la bono de la homaro.





Definitivan programon vidu en la kongreslibro. Eventualajn ŝanĝojn la aranĝantoj de la diversaj kunsidoj pritraktu kun O. K. K.-sekretario, same kromajn kunsidojn. Ni publikigos ilin sur informtabulo. Pro tio estas necese, ke ĉiu kelkfoje dum la tago rigardu la informtabulon. Ankaŭ ĉiuj ekskursoj estos afiŝitaj tie.

TAGORDO DE LA KONGRESAJ KUNSIDOJ

Dimanĉe, dum la solena malfermo de la kongreso parolos kiel unuaj la eminentuloj registaraj kaj poste la diversaj reprezentantoj de la landoj kaj fakaj asocioj kaj ĉe la fino estos elektataj la kongresaj funkciuloj: Prezindantaro, Protokolantoj, Proponkomisiono kaj voĉdona komitato.

Unua laborkunsido:

Enkonduka paroladeto.

Pritrakto de la Raportaro de la Plenumkomitato (vidu junian numeron de Sennaciulo), inkluzive la financon kaj redakciajn raportojn; kompletigo fare de k-do Bartelmes.

Dua laborkunsido:

Sekvo de la diskutado. Konkludoj, Voĉdono pri la P. K. raportaro.

Raporto Ĝenerala konsilantaro

Raporto Konflikto-Komisiono

Raporto Literatura Komitato

Raporto LEA-Komitato

Raporto Koresponda Servo

Raporto Solidar-Servo

Raporto Vojaĝ-Servo

kaj voĉdonoj.

Reelekto de Plenum-Komitato

Reelekto de Konflikto-Komisiono

Proponoj

Deziresprimoj pri venontjara(j) kongresurbo(j)

Gvidrezolucio de la Kongreso

Eventualajoj.

Ĉar la tuta programo verŝajne ne estas ebla dum du laborkunsidoj, ni ankaŭ disponigis tempon por tria laborkunsido, dum kiu estos daŭrigota la programo de la dua laborkunsido.

Partoprenantoj malpli ol 30 jaraĝaj kaj ankaŭ aliaj interesuloj nepre partoprenu la junulfakan kunsidon, okazante dimanĉe, la 7-an de aŭgusto je la 17-a. La numero de la kunvenĉambro estos anoncata sur inform-

tabulo. Estos inter aliaj aferoj ankaŭ pritraktota la postkongresa vojaĝo al Klinke kabano ĉe Admont.

Fakaj kaj frakciaj kunsidoj:

Pro la fakto, ke parto nur povas ĉeesti sabate kaj dimanĉe, k-do Javernik petis min, aranĝi la fakkunsidon de la Grafikistoj (IGEL) jam sabate posttagmeze je la 14-a, se necesos ankaŭ dimanĉe je la sama tempo. Ekskurso por IGEL al Gutenberg-presejo okazos lunde je la 15-a (Atentu, nombro limigita je 20 personoj).

Pro sama kaŭzo fakkunsido de la pacamikoj okazos dimanĉe je la 14-a horo.

La aliajn kunsidojn vidu en kongreslibro kaj sur informtabulo. Tute ne eblas, eviti, ke kelkaj kunsidoj okazu samtempe. Tamen ni klopodis akcepti la dezirojn de ĉiuj grupoj.

En interkonsento ankaŭ povas okazi pluraj kunsidoj jam matene de la 8-a ĝis la 9-a horo.

Informejo:

Ĝi estas malfermita de la oka matene ĝis la 20-a vespere, krom la laborkunsidoj kaj ekskurstempoj.

Informoj estas riceveblaj pri la kongresa programo, la urbo, la vizitoj al muzeoj kaj fabrikoj, postkongresaj aranĝoj, la horaro de vagonaro ktp. Ne okupu O. K. K. kaj informojn pri bagatelajoj, faciligu al ili la laboron.

En la kongresejo estas instalita speciala poŝtoficejo, kiu vendas la aŭstrian Esperanto-poŝtmarkon kaj uzos specialan poŝtŝtampilon. Ne uzu la urbajn poŝtoficejojn, sed la kongresan en la kongresejo. Korespondaĵoj estos indikitaj ĉe la poŝtoficejo sur aparta tabulo. La kongresantoj ricevas ilin, montrante la kongreslibron.

Interkontakto de kongresantoj: petu en informejo preparitan slipon kaj plenigu ĝin. O. K. K. fiksos ĝin sur informtabulo kaj la serĉato povas vidi tion sur la tabulo. Pro tio ankaŭ estas konsilinda, ke vi rigardu preterirante la tabulon.

Similan ni preparos por aĵoj perditaj aŭ trovitaj. Gek-doĵ, kiuj ion trovas, estas petataj, deponi tion en informejo.

Samtempe kun la kongreso ankaŭ okazos ekspozicio, publike vizitebla. Eble ankaŭ kelkaj propagandistoj el tiu trovas sugestojn.

Kongresa restoracio:

Ĝi estas en la kongresejo mem kaj servas por tag- kaj vespermanĝo. Pago nur per kuponoj. Neuzitaj kuponoj ne estas repageblaj. Plendojn eventualajn tuj direktu al O. K. K.-sekretario.

Aliaj restoracioj rekomenditaj:

Gastejoj: Schwarzer Anker, en strato de kongresejo, en la sama domo, kiel la kongresejo mem,

Mühlviertler, Graben,

Stadtgut, Volksgartenstrasse,

Weisses Lamm, Herrenstrasse,

Stacidoma restoracio,

Gasthaus zur Stadt Linz, Mozartstrasse,

Eisenhand, Mozartstrasse.

Matenmanĝon vi mem prizorgu aŭ en kaf-trinkejo aŭ en iu de la multaj laktovendejoj, kie estas riceveblaj varma lakto kaj bulkoj aŭ alia farunaĵo laŭ deziro. Tiuj estas multe malplimultekostaj ol matenmanĝo en gastejo. Kelkaj hoteloj postulas, ke la dormantoj ankaŭ matenmanĝu tie, aliel plialtiĝos la prezo. Ni speciale indikis tiujn en la kongreslibroj kaj samtempe ankaŭ evitis kiel eble tion.

Ekskursoj:

Per Danubsipo ĝis Neuhaus kaj reen. Ekveturo precize je la 14-a ĉe la nova danuboponto. Nur eblas por tiuj, kiuj havas la ŝtampilon en la kongreslibro kaj por partoprenantoj de la geknaba kongreseto (senkoste).

Tuttaga: Preciza ekveturo de la ĉefplaco je la 7-a. Rigardu ankoraŭ la informtabulon, ĉu de via dormejo ne alportas vin aŭtobuso al la ĉefplaco. Ni nepre devas precize ekveturi, ĉar ni estos akceptitaj survoje kaj havas sufiĉe ampleksan programon, kiu postulas, ke ni ne malfruigu. Ni vidos inter alio la Traunlagon, Wolfganglagon, Mondlagon kaj Atterlagon. En Lenzing ni vizitos tre modernan lernejon, kies direktoro estas ankaŭ kamarado kaj volonte montros al ni sian lernejon. Vespere ni ree manĝos hejme.

Pri la vizitoj al fabrikoj ni atentigas vin, ke por vizito de feruzino vi devas pagi kelkajn ŝilingojn, ĉar vizito de tiu entrepreno nur eblas per aŭtobuso pro la amplekso.

Respondeco:

En ĉiu Amasloĝejo kaj en la tendejoj troviĝos respondeculo, O. K. K.-ano dum la tuta semajno. Se necese, turnu vin nur al li. La aliaj estas neesperantistoj. Ne forgesu, ke ni en Amasloĝejoj estas gastoj kaj observu pro tio la necesan disciplinon. Revenante hejmen dumnokte grupigu por ne tro ĝeni la servantojn. Sekvu la konsilojn de la respondeculo.

GEKNABA KONGRESETO!

Vi ricevos ĉe la alveno kongreslibron specialan.

La gepatroj estas petataj, tralegu la kongreslibron por la geknaba kongreseto kaj ĉe nekonsento pri iu punkto tuj kontaktu O. K. K.-sekretarion. La geknaboj dum la kongresa semajno estas asekurataj.

PRI LA KONGRESA PRELEGO DE K-DO BARTELMES

Homoj kaj Simboloj en »Faŭsto« de Goethe

K-do Bartelmes, kiu tradukis la tutan »Faŭsto«-n de Goethe (sed nur la unua parto estas eldonita ĝis nun), prezentos karakterizon de la ĉefaj figuroj en tiu verko, ilian signifon en la agado de tiu dramo kaj la filozofan sencon, kiu spegulas la spiritostaton de la verkinto. Por esprimi la plej subtilajn pensojn, Goethe ofte serĉas helpon ĉe simbola prezentado. Unualege tia prezentmaniero povas mirigi, eĉ ŝoki personojn, sed post pripensado oni konstatas, ke tia trakto de l'problemoj pri viv-origino kaj -senco havas la povon proksimigi nin al la solvo de l'plej profundaj, ŝajne misteraj demandoj kaj rilatoj. Per siaj eksplikoj k-do Bartelmes esperas varbi novajn amikojn al tiu klasika ĉefverko.

LA PLEJ GRAVA LEĜO DE LA KONGRESO!

S. A. T.-kongreso ne nur okazos por bona pasigo de la libertempo, dum ĝi estas pritraktotaj multaj gravaj aferoj en labor-kunsidoj kaj en fak- kaj frakcikunsidoj. Pro tio estas ankaŭ necesa, ke ĉio funkcii kiel eble bone, sed, la O. K. K. povas klopodi al bona organizo kiel ajn, se mankas la precizeco, la tuta programo ne plu taŭgas. Ĉu tio okazos rilate la labor-kunsidojn, la fak- kaj frakcikunsidojn aŭ pri iu alia aranĝo estas tute egale. Se pro malfruigo devas esti prokrastata unu kunsido aŭ ne estas eble pritrakti la diversajn gravajn punktojn ĝisfunde, kio certe ne kontentigas la ĉeestantojn, aŭ plilongigas la kunsidon kaj ĉiamaniere baras la sekvontan aranĝon.

Ne forgesu, ke O. K. K. volonte preparis ĉion kiel eble plej bone, sed dependas de la disciplino de la unuopaj partoprenantoj, ĉu ankaŭ ĉio funkcios kontentige. Neniu montru sin neinteresita pri la diversaj aranĝoj. Ĉiu havu la eblecon, sciigi pri la programo de la tuta tago, legante la informtabulon en la legoĉambro. Estas la programo ofte tro ampleksa, por instali paŭzojn inter la diversaj aranĝoj, pro tio precizeco estas nepre necesa. Kaj, partoprenante kongresojn oni ofte spertas, ke ekzistas homoj, kiuj parolas laŭŝajne nur, ĉar ili emas esti aŭditaj, aŭ volonte aŭdas sin mem. Tion ni evitu dum nia kongreso. Racio estu la dua leĝo, same grava kiel la precizeco. Oni ankaŭ ne per aliaj vortoj diru ion, kion jam antaŭe diris iu. Ĉiu parolo okazu kiel eble mallonga, sed ankaŭ kiel eble preciza.

Laborista Universitato!

Kiel ankaŭ pasintjare okazos ĉijare prelegoj en kadro de laborista universitato. Ĝis nun nur estas anoncigitaj jenaj prelegoj:

S-ano kort. kons. Hugo Steiner, fondinto de la Internacia E-muzeo en Vieno prezentos lumbildprelegon pri la muzeo. Ĝi ne nur estas interesa, sed ĉiu esperantisto estu informita pri ĝi. Daŭro proks. unu horon. Ĝi samtempe estas la malferma prelego de Lab. Universitato.

K-do Bartelmes prelegos pri »Homoj kaj Simboloj en Faŭsto de Goethe« (vidu kunmetitan ekstrakton!).

K-do Winter el Munkeno prelegos pri la »Internacia studrondo esperantista«. Lia prelego enhavas jenajn gravajn punktojn:

1. Kian koncepton vi havas pri la vortoj demokratia, socialismo kaj socialista kulturo?
2. Kiuj faktoroj krom la heredo kaj medio kontribuas en la formado de la homo?
3. La rilato inter religio kaj moralo?
4. La rolo de edukado a) en familio, b) en la lernejo, c) en la junularaj societoj k. t. p.?
5. Ĉu la lernejo donu neŭtralan instruon rilate sociajn, politikajn kaj religiajn demandojn?
6. La signifo de gazetaro, filmo kaj radio en la edukado kaj en formigo de opinioj?
7. La rolo de belartoj en socialista socio?



Do, sufiĉe ampleksa programo, el kiu povas fariĝi sufiĉe interesa diskutado. Ni prenas la prelegon pro tio kiel lastan, okazante vendrede antaŭtagmeze kaj ni esperas viglan diskutadon de la diversaj punktoj, kiuj devas ja interesi ĉiujn homojn, kiuj estas realistoj kaj interesitaj pri la tuta vivo kaj la al ĝi apartenantaj aferoj.

(Ĉar ni la temojn de viaj prelegoj ankoraŭ ne posedas, ni petas, publikigi ankaŭ el ili ekstraktojn, por ke la partoprenantoj de la kongreso sciu, kaj prelegoj estas por ili interesaj kaj al kiuj ili povas elekti la ĝustajn tagojn por la ekskursoj respektive prelegoj.

Kvara prelego estas anoncita de Asocio Bellamy, prelegonto: K-do v. d. Starre.

PENSU LIBERE
KAJ AGU

SENNACIECE

ALVOKO DE I. S. K. K. E.

En kadro de SAT kongreso en Linz, okazos la 10-an de aŭgusta ĉ. j. la III-a konferenco de Internacia Sindikata Kontakta Komitato Esperantista. Por tiu ĉi konferenco estas antaŭvidita jena

TAGORDO

1. Kunlaboro de ISKKE kun sindikatoj, laboristaj kultur-klerigaj societoj kaj grupoj,
2. Disdivido de laboro laŭ sektoroj,
3. Buĝeto de ISKKE,
4. Elekto de komitatanoj.

La manierojn kaj metodojn de la kunlaboro kun sindikatoj, laŭ mia opinio en hodiaŭa tempo oni facile trovas. Ni kiel membroj de sia sindikata filio komencu en ĝi, unue pere de individua klarigado poste publika parolado ĉe kunvenoj k. t. p.

En kadro de sindikatoj kutime agas kultur-klerigaj laboristaj societoj aŭ grupoj, en kiuj ni same povas enpenetri.

Grava estas laŭ mia opinio la punkto de tagordo, disdivido de laboro laŭ sektoroj. Ĝis nun ni praktikis elekti komitatanojn, sed, montriĝis ke komitatanoj ne sufiĉe memstare, (krom opaj esceptoj) agis kaj kvazaŭ ne trovis laboron kiel komitatano. La disdivido laŭ sektoroj ebligis al opa komitatano agi senĝene. La sektoroj laŭ mia opinio povas esti jenaj: organizaj formoj de sindikatoj en la mondo, kultur-kleriga agado, sindikata prezo (gazetoj kaj ceteraj eldonaĵoj), sporto inter laboristoj, eldonaj fakoj kaj samtempe la financaj rimedoj k. t. p. Aparta punkto estas la buĝeto. Pri manieroj kiel havigi monajn rimedojn por la senĝena kaj fruktodona agado estas same afero diskutinda. Mi estas konvinkita se ni ĉiuj pripensas sobre pri la manieroj, metodoj kaj tuta nia laboro, dum konferenco ni faros decidojn efektivigotajn.

F. Vokoun

**SAT-
LIBRO-
SERVO**

FUNKCIOS DENOVE

DUM LA

KONGRESO

La 29-a SAT Kongreso en Jugoslavio

Esperanto movado en Jugoslavio neniam havis tiajn bonŝancojn kiel nuntempe. En malnova Jugoslavio la movado estis forta, sed ne havis kuraĝon organizi internaciskalan kongreson, ĉu neŭtralan aŭ laboristtendencan. Okazis enlandaj kongresoj, kiuj tiam sub la protekto de negravaj personoj en la publika vivo, ne havis ian plifortan reputacion. Tiel ni laboris ĝis la okupado de la lando flanke de ĉiuspecaj faŝistoj.

Post la naciliberiga batalo kaj liberigo de la lando, la laboristtendencaj esperantistoj enportis en la movadon pli freŝan sangon, pli impulsan ritmon, sed ĝi ankoraŭ ne havas tian rezulton kian ĝi ja devus havi pro manko de homoj sur la pli gravaj pozicioj en nia movado. Tamen, la rezulto de nia laboro montris ke nia linio, sur kiu ni fine ekmarŝis, gvidas nin al la celo de vera signifo de la Esperanto movado. La 16-a enlanda kongreso de jugoslavaj esperantistoj estis la ŝanĝilo de nia enlanda poresperanta vivo. Nia devo estu: subteni la gvidantojn ke efektiviĝu niaj planoj: pli fortigi nian enlandan kaj eksterlandan pozicion en la movado aranĝante Internaciajn kongresojn. Ni havis la kongreson 1953 j. de la tutmonda esperantistaro, sed ne de la tutmonda laboristtendencaj esperantistaro, kies batalo por la ekonomia liberigo estas diversopinia. Laboristoj-esperantistoj tutmondaj, kiuj montras intereson por nia lando, por nia vivo, havas bonŝancon en la jaro 1956 per propraj okuloj vidi, per propraj oreloj aŭdi libere opinion pri nia praktika enkonduko de socialisma doktrino en la vivpraktiko.

La gvidantoj de nia lando, ĉiam subtenis progresemajn tendencojn en la mondo, inter tiuj — Esperanton. En ĉiuj internaciaj institucioj nia lando subtenas la proponojn ke la popoloj fine ekkompreniĝu per unu lingvo konforma kaj simpla al la popoloj. Tiam starpunkton havas nia gvidanto k-do Tito, kiu diris inter alie: »Esperanto devas lerni intelektularo, ĉiuj kiuj havas kontakton kun eksterlando, kaj precipe laboristoj. Mi scias, ke esperanto estas pli disvastigita inter la laboristaro. Por laboristoj de la mondo esperanto ja havas apartan signifon. En ĉio respeguliĝas la deziroj de laboristaj amasoj por interligo kun la eksterlanda mondo.«

Nin komprenas ankaŭ la sindikataj gvidantoj, kiuj donas plenan apogon por aranĝo de 29-a SAT kongreso en nia lando en urbo Beogrado kiel centro de nia Federacia Respubliko Jugoslavio.

Ni invitas tutmondajn laboristtendencajn esperantistojn ke venu nian landon kaj subtenu nian agadon.

La jaro 1956 estu la manifestacio de nia tutmonda laboristtendencaj esperantistaro. Laŭŝajne la mondsituacio pliboniĝas kaj niaj rilatoj kun la najbaraj landoj kiel Bulgario, Hungario, Albanio, Rumanio, Polio, Ĉeĥoslovakio pli amikiĝas kaj konsolidiĝas. Estu nia tasko, ke ni post longaj jaroj komune manifestu nian deziron: Per la lingvo esperanto unuiĝu — Inter ni regu la toleremo kaj komprenemo!

Josip Vajdlih,
Landa peranto por Jugoslavio

AL LA LINZ-a SAT-KONGRESO

Amikoj ĉiulandaj!

Al ĉiuj kongresantaj

Saluton sendas mi.

El kruta alpa lando

Ĝis fora mara rando

jen sonu mia kri':

Per nia verda stelo

Al sennacia celo,

Triumfon konu ĝi.

Ke estu en tutmondo

Ne plu militrenkonto,

Nur paca harmoni'!

LA VOĈO DE L'KONGRESO

Ambaŭ numeroj estis eldonitaj en Jugoslavio, por utiligi tien la parton de la kongresa kapitalo. Ni ŝuldas al la tieaj gek-doĵ en Zagreb multan dankon por ilia modela kunlaboro.

LISTO DE L' ALIĜINTOJ

(Daŭrigo)

146 Schmid, 147 Schwarz, Aŭstrio, 149 Lopes, Francio, 150 Marin, Anglio, 151 Javernik, 152 Thöndel, Aŭstrio, 153—155 Grandiere, 156—159 Kleinclaus, 160 Lagrange, 161 Lemoy, 162—163 Levy, 164 Guedon, 165 Reyneau, Francio, 166 Braun, 167 Hruby, 168 Hanisch, 169 Spicak, 170 Kafka, 171—172 Finkenzeller, 173 Ullrich, 174 Eichinger, Aŭstrio, 175 de Weerd, 176—177 van Aelst, 178 v. d. Starre, 179 Mes-Gossen, 180—181 Dronkers, 182 v. d. Starre, 183 Sammeling, 184 v. d. Starre, 185—186 Hovener, 187 Beket, 188 Derlagen, 189 Rijswijk, 190—191 Ossevort, 192 Vletter, 193—194 Quispel, 195—196 Allis, 197 Mol, 198 Donkelaar, 199 Pieperiet, 200 Slot, 201 Hof, 202—203 Ool ter, 204—205 ten Hagen, 206 Heykoop, 207 Viman, 208 Barentsen, 209 Sigle, Nederlando, 210 Pistorius, Aŭstrio, 211 Zachte, 212 Kater, 213 Nöboer, 214 Vugteven, 215 Lecq, 216 Tuin, 217 Both, 218 Timmes-Bakker, 219—220 Koppenjan, 221—222 Wal, 223—224 Abbes, 225—226 Hansen, 227 Twuiver, 228 Huisman, 229 Kaptein, 230 Kamlag, 231 de Jonge, Hansen, 227 Twuiver, 228 Huisman, 229 Kaptein, 230 Kamlag, 231 de Jonge, 232 Netten, 233 Hagedoorn, 234—235 Stellingwerf, 236—237 Bernard, 238 Suurmans, 239 Schothorst, 240—241 Meijer, 242 Reyen, 243—244 Breevaart, Nederlando, 245—248 Lubik, 249 Riviere, 250—252 Tuison, 253 Jeanjean, 254 Hortolen, 255 Maurin, 256 Rofa, 257 Cossard, 258 Kirch, 259 Herbé, 260—261 Duboc, 262 Piron, 263 Pigault, 264 Cherpeau, 265—267 Blary, 268—270 Motto, 271—272 Sallot, 273—274 Cuillerdiers, 275—276 Delsol, 277—

UNU MONDO

UNU HOMARO

UNU LINGVO

278 Hadjadj, 279 Evrard, Francio, 280—281 Blink, 282—283 Quispel, 284 Quispel, 285 Rietveld, 286—287 Poort, 288 Meijer, 289 Leer, 290 Oooms-Jongsma, 291—292 Putten, 293 Corstanje, 294 Gemser, 295—296 Moerman, 297 Bueno de Mesquita, Nederlando, 298 Popović, 299 Jutriša, 300 Sekelj, 301 Grujić, 302 Hurčak, 303 Katić, 304 Antonijević, 305 Milenković, 306 Karlenša, 307 Sekelj, 308 Volkoun Franjo, Jugoslavio, 309—310 Plowman, Anglio, 311—312 Kristensen, 313 Hansen, 314—315 Jensen, 316—317 Jensen, 318 Johansen, 319—320 Jansen, 321 Jensen, 322—323 Jensen, 324—325 Skyum, 326 Jensen, 327 Jensen, 328 Jensen, 329 Birgit, Danio, 330 Eneroth, 331 aKrlsson, 332—333 Ström, 334 Karlsson, 335 Eriksson, 336—337 Lindkvist, 338—339 Johansson, 340—341 Nilsson, 342 Nilsson, 343 Mackenzie, 33 Beg, 345 Samuelsson, 346—347 Cronquist, 348—349 Boberg, Svedio, 350 Rhee, 351 Krombeen, 352 Beek, 353 Rooke, 354—355 Weber, Nederlando, 356 Dekrom, Belgio, 357—360 Kvanter, 361 Kwak, Nederlando, 362 Marchal, 363 Fabert, 364 Perret, 365 Damarin, 366 Sadier, 367 Vidon, 368 Vanlouve, 369 Bosland, 370 Laurat, Francio, 371—372 Schaltegger, Svisio, 373—374 Keilwagen, 375 Knoop, 376—377 Michalski, 378 Haerlein, 379 Behrndt, 380 Wagenknecht, 381 Senger, 382—383 Esche, 384 Winter, 385—386 Firmenich, 387 Tietsch, 388 Hajek, 389 Gahn, Germanio, 380 Borin, 391 Besenghi, 392 Delogu, Italio, 393 Josip Preksavec, 394 Stanislav, 395 Bičanić, 396 Havana, 397—398 Zlatnar, 399 Vajda Mirko, 400 Mokker, 401 Sepek, 402 Crnković, 403 Bartolić, 404 Obad Geza, 405 Viktorija Sidi, 406 Rozalija Pergl, 407 Marica Stojanac, Jugoslavio, 408—409 Kindgren, 410 Jonasson, Svedio, 411 Larsen, Danio, 412 Bois, 413 Romancer, 414 Barrio Tarbes, 415 Germain, 416 Tissot, 417 Piron, Francio, 418 Kouwen, 419—420 Boersma, 421—422 Immig, 423 Lennars-ten Hagen, 424—425 de Bes, Nederlando, 426 Maillet, Francio, 426a Binder Austrio, 427 Gustafson, Svedio, 428 Zimmermann, 429 Karner, 430 Angermayr, 431 Szabo, 432 Mickstätter, Austrio, 433 Madsen, Danio, 434 Andersson, 435—436 Andersson, 437 Borg, 438—439 Lundgren, Svedio, 440 Duflot 441 Chazal, 442 Thomas, 443—444 Oustlant, 445—446 Royannez, 447 Long, Francio, 448—449 Ram, 450—452 Schmale, 453—454 Verhoog, 455—456 Haren, 457 Keuter, 458—459 Akker, 460 Hesses, 461 Kortenaar, Nederlando, 462 Ullström, Svedio, 463 Olsson, 464—465 Jordahl, Danio 466—467 N. N. 468—469 Melton, 470 Britten, 471—482 12 knabinoj el Birmingham, Anglio, 483 Salamun, 489 Verač, 491 Domajenko, Jugoslavio, 492 Halliday, Anglio, 493 v. d. Wal, Nederlando, 494 Barotić, 495 Aleksandar, 496 Kazačić, 497 Vesanović, 499 Radoslav, 500 Hrepić, 501 Canadi, 502 Pavičić, Jugoslavio.

Eldonas: Laborista Esperanto societo Zagreb, ĉefa kaj respondeca redaktoro, **Volkoun Franjo**, Zagreb, I., Stara Peščenica 50. Teknika redaktoro **Obad Geza**, Zagreb II, Svearova ul. 1. — Presejo: »Ognjen Prica«, Zagreb, Savska cesta 31, Jugoslavio.